

Literatura Mondo, 8-a parto:
Polemiko inter Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 634, 1975.12.03 & 06

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la unua periodo de **Literatura Mondo** kaj dum la komenco de la dua periodo, tio estas inter 1922 kaj 1933, la du ĉefverkistoj de tiu ĉi revuo estis Kolomano Kalocsay kaj Julio Baghy. La unua publikigis en **Literatura Mondo** originalajn kaj tradukitajn poemojn kaj tre interesajn prilingvajn artikolojn. La dua ankaŭ verkis poemojn, sed ĉefe per siaj prozaĵoj, interalie humurplenaj noveloj kaj romanoj, li kaptis la atenton de la legantoj.

A.- Iom post iom ambaŭ verkistoj personigis kontraŭan vidpunkton en la akriĝanta polemiko por aŭ kontraŭ beletrismaj neologismoj. Kolomano Kalocsay estis por la neologismoj, Julio Baghy kontraŭ. En januaro 1933 la polemiko subite akriĝis. En *sia angulo* Julio Baghy aperigis poemon, kies titolo estas : *Ĉu Ido aŭ Poliglota ? Ne ! Esperanto*. Kaj la subtitolo estis : *Versaĵo verkita laŭ la Poezia Fakvortaro de K. Kalocsay kaj G. Waringhien*. Jen ero el tiu atako kontraŭ Kalocsay kaj *Literatura Mondo*, en kiu Baghy uzis 130 neologismojn :

Cl.- « [...] *Ci, turpa lingvo, povrul', ESPERANTO,
Ci, plumpa trampo en trivita vest',
el mond' rilegos vin ni sen rimorso
kaj stridos de easto ĝis uest',
ke forcas ni la progreson, sed promptan,
per bunta pimpa pompo de l' Parnas',
la lantan takton ni vringos, sepultos
kaj ESPERANTO estos nur – fáttras'.* »

A.- Verŝajne vi ne multon komprenis el tiuj versoj, kaj ĝuste tion ĉi celis Julio Baghy. Aŭskultu ankoraŭ la konkludon de tiu ĉi militdeklaro al la neologismemuloj:

Cl.- « [...] *Kultivas lingvon kaj haŭlas veselon
la novaj Leau, Couturat kaj Beaufront.
La prominentaj lucidaj ĝenioj
jam levas cenotafon por vivant' ;
la kurtan moton ni konas de jaroj :
« Hej, vivu IDO ! Bas, bas, ESPERANT' ! »*

Kaj nun permesu prozan demandon en komprenebla lingvo : Ĉu vi konsentas pri tia perforta evoluigo kaj IDO-igo de nia lingvo ?

*Ne miru do, se lastatempe multaj batalantoj forlasis la movadon kaj ne miru, se vi konstatos, ke Esperanto fariĝis la plej malfacila lingvo el la lingvoj. La literaturo, kies ĉefa tasko estas prilabori la lingvon el ĝiaj naturaj elementoj kaj gardi la unuecon, uvrís aŭ apertis aŭ simple malfermis la vazistason (?) por la lingva anarĥio. Jen unu el la principaj kaŭzoj, kiu devigis min rezigni pri la ĉefredaktora titolo de **Literatura Mondo**.* »

A.- Kolomano Kalocsay ne senreage akceptis tiun ĉi demision de Julio Baghy. Kiel ĉefredaktoro li malfermis *Diskuton*, kies kelkajn eroj ni citas :

Cl.- « Kara Baghy !

*Certe, via poemo havas sovaĝan aspekton. Sed, ĉu vere tiel aspektas la stilo de **Literatura Mondo** ? Nu, ne. 130 neologismojn vi amasigis en via **sola poemo**, sed el ĉi tiuj nur 18 aperis en **du plenaj jarkolektoj** de **Literatura Mondo**. Do, se vi intermiksas la Parnasan Gvidlibron kun **Literatura Mondo**, vi evidente tiom troigas, kiom vi kutimas, kiam vin kuntrenas via pasio. [...] Ni devas diri, ke la principaj kaŭzoj de via abdiko estis aliaj. Mi ne malkaŝos ĉi tiujn kaŭzojn, ĉar tio estas viaj tasko kaj rajto, ne la miaj. Eble vi diros ilin en alia **Mia Angulo**. Mi tre bedaŭras, ke mi devis vin tiel senigi de la **plej populara kaj taktike plej oportuna** motivado de via abdiko. Sed ĉi tiun motivadon vi faris en formo de atako, do vi ne povas koleri, se ni defendas nin kontraŭ la atako. Fakte estas, ke via unua decida malaprobo kontraŭ la neologismoj venis al ni kun ses aliaj kaŭzoj de abdiko, en via abdika letero. Sed, mi neniam ŝatis personaĵojn, precipe estus malagrabla kvereli kun vi, al kiu mi sentas ankaŭ nun amon kaj amikecon. Mi do finas ĉi tiun senbenan disputon. »*

A.- Kalocsay daŭrigas sian artikolon per, kiel li diras, « **senpartia kaj senemocia** eseeto pri la neceso de neologismoj en la poezia vivo. » La venontan semajnon ni resume raportos pri tiu ĉi teksto, kiu bone difinas la verkistan sintenon de Kalocsay, kiu, fakte, estis diametre kontraŭa al tiu de Julio Baghy.

Cl.- Hodiaŭ ni atentigu vin, ke malantaŭ la titolpaĝo, en alvoko al la abonantoj titolita **Kara leganto !** la redakcio de **Literatura Mondo** faras tiun ĉi promeson :

A.- « La redakcio [...] pli severe atentos pri la uzo de neologismoj. Tute sin ligi al la oficiala vortprovizo aŭ al la vortoj de la **Plena Vortaro** ĝi ne povas, sed neologismojn ĝi toleros sole en poemoj, aŭ en tia prozo, kiu estas kvazaŭ poemo en prozo, se la aŭtoro ne volas pri ili rezigni. El aliaj taskoj ĉiujn vortojn ne troveblajn en la **Plena Vortaro** ĝi forstrekos kaj anstataŭigos. Ĉiujn poeziajn vortojn ĝi klarigos je la fino de la revuo. Do de nun ĉiu neklarigita vorto estas elserĉebla el la **Plena Vortaro**. [...] »

Cl.- Tiu ĉi sinteno de la redakcio ne kongruis kun tiu de Kalocsay, la ĉefredaktoro de **Literatura Mondo**. Dueco, kiu ne povas daŭri. La jaro 1934 inaŭguras la trian periodon de **Literatura Mondo**, kiun karakterizas la foresto kaj de Kolomano Kalocsay kaj de Julio Baghy. Granda perdo por la revuo kaj tutcerte por la esperanta beletro. Sed tio vipis aliajn talentojn

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!